

Jarraportoj de Esperanto-USA

2018

**Preparita por la kongreso en Seatlo,
Vaŝingtono, Usono
julio 13 – julio 16, 2018**

**Esperanto-USA
1500 Park Ave STE 134
Emeryville CA 94608**

**tel: 510.653.0998
fakso: 866.200.1108**

**eusa@esperanto-usa.org
www.esperanto-usa.org**

Table of Contents

Raporto de la Prezidanto.....	3
Raporto pri la 48-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2017.....	7
Raporto de la Daŭra Landa Kongresa Komitato 2018.....	8
Raporto pri Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo.....	9
Raporto de la Direktoro.....	11
FINANCAJ DOKUMENTOJ.....	12

Raporto de la Prezidanto

Raporto de la Prezidanto de Esperanto-USA por la 66a Landa Kongreso en Seatlo, Vaŝingtonio, la 13a – 16a de julio, 2018.

Enkonduko

Jen niaj agadoj ekde la Landa Kongreso de 2017 ĝis nun, kaj notas ilin per kvar agadkampoj: Konsiigo, Kapabligo, Komunumo, kaj Kunordigo.

Nova Aktiveco per la Nova Estraro [kunordigo]

Post la Landa Kongreso de 2017 in Raleigh, la nova estraro komencis kunsidi intere per Slack.com, kaj en nur kvar monatoj jam interŝanĝis 10,000 mesaĝojn. Ni multe aktivis rilate al niaj problemoj, planoj, kaj mankoj ĉe diversaj flankoj. Komence en decembro, 2017, ni kunsidis per Zoom ĉiumonate. Ĉiun fojon ni havis kvorumon en nia estraraj kunsidoj. La temoj de ĉi tiuj raportoj estas ĉefe la rezultoj de tiu laboro, en kiu ni komunikis ĉefe per Zoom, Slack, retmesaĝoj, kaj la telefono.

La Centra Oficejo [Kunordigo, Kapabligo]

Vilĉjo Harris, la Direktoro de La Centra Oficejo de Esperanto-USA, plenumis la taskojn tre efike. Li plenumis mendojn por libroj kaj aliaj varoj, metis librojn en la libroservon de Amazon.com, helpis kaj kunlaboris kun la estraro, respondis al informpetintoj, kreis kaj sendis la membroliston, laboris kun la redakcio pri Usona Esperantisto, pritraktis membrecon, prizorgis financajn aferojn, partoprenis estrarajn kunsidojn, helpis pri la nova retejo (vidu sube), kaj faris aliajn taskojn. Ni ne spertis problemojn pri la Centra Oficejo, kaj la oficejo ne translokiĝis dum tiu periodo.

La Centra Oficejo de Esperanto-USA Translokiĝas [Kunordigo]

En la pasintaj jaroj, Esperanto-USA perdis monon jaron post jaro, je proksimume \$30,000 jare. Tiu situacion ne povas daŭre longtempe. Sekvante ideon de la antaŭa prezidanto Orlando Raola, la estraro kune kun la Direktoro de la CO decidis movi la oficejon al la ŝtato Majno. Tie loĝos Bill Harris denove. Li funkciigos la oficejon en sia hejmo. Tio konservos nin la koston de la oficejo en Kalifornio. La translokiĝo okazos en novembro, 2018.

La ĉefa kialo por la translokigo estas ĉesigi la monperdegon de nia financa saldo. Ni estas en bona financa stato, sed ni volas multe stabiligi nian financon bildon por la estonteco. La venontaj estraroj rajtos agadi sen la defio de la antaŭa granda monperdo.

La Libroservo [Kapabligo]

La ĉefa kialo por havi centran oficejon estas servi la membrojn, kaj la ĉefa bezono por oficeja spaco estas la libroservo. Ni nun vendas multajn librojn per Amazon.com kaj kiel peranto de la retbutiko ĉe UEA.org. Pro tio, ni ne plu bezonas tiom da fizika spaco. Nia retbutiko daŭros, sed kelkaj retligoj por libroj donas referencon al la aliaj libroservoj. Ni havas ankaŭ pli da libroj en bitformo por elŭti, kelkaj senkostaj kaj kelkaj je malaltaj kostoj. Iu ajn rajtas aĉeti varojn de nia retbutiko, sed la rabatoj daŭros por nur membroj de Esperanto-USA.

Ni klopodas vendi la librojn, kiuj jam restis nevenditaj dum dek jaroj. Ni malaltigis la prezon de tiuj libroj por vendi ilin pli rapide. La kosto de la libroj aperas en nia financaj raportoj per la originaj kostoj de ĉiu libro. Pro tio ni suferos iom da financa perdo, ĉar ni vendas la stagnaj librojn kontraŭ malpli da mono ol ili kostis al ni.

Financa stato [Kunordigo]

Pro la translokiĝo de la centra oficejo kaj pro la ŝanĝiĝoj en la libroservo, nia financaj raportoj havos neregularajn altiĝoj kaj malaltiĝoj. Vidu niajn raportojn en ĉi tiu jarraporto por la plej ĝisdatigaj saldoj. Ni klopodas provizi ekvilibran buĝeton al vi por 2019. Ni komencas funkcii per ekvilibra buĝeto en la venontaj jaroj, danke al la ŝanĝiĝoj en la Centra Oficejo. Se vi konas la financon perdon de la pasintaj jaroj, vi certe rimarkos la pliboniĝon en la venontaj du jaroj.

La estraro ne decidis plialtigi la aliĝkoston por membriĝi al la asocio.

Mondonaco de ESF – Esperantic Studies Foundation [Kapabligo, Konsciigo]

Por uzi dum dujara periodo (2018-2019) ESF mondonacis al Esperanto-USA \$20,000 por edukada helpo. Tiu mono haveblis en tri kategorioj:

- 1 Por lokaj grupoj
- 2 Por regionaj kaj landaj eventoj
- 3 Por maturigo kaj trejnado de junuloj

Ni eluzis la monon por la regionaj kaj landaj eventoj. Ni daŭre ricevos proponojn por edukaj projektoj en kategorioj 1 kaj 3. Ĉi tiu mondonaco multe helpis al Esperanto-USA kaj NASK per pagi la aliĝkoston de eventoj, kiel la Landa Kongreso, NASK, kaj regionaj eventoj.

Ni multe dankas al ESF pro la monhelpo, la pliforta rilato inter la organizoj, kaj la pli oftaj komunikadoj inter niaj gvidantoj.

Nova Retejo [Konsciigo]

Post la Landa Kongreso de 2017, la retejo de Esperanto-USA tute paneis. Ĝi estis en tiel nebona stato ke ni ne povis restarigi ĝin. Post unu semajno (!) ni havis novan dulingvan retejon kun sufiĉaj enhavoj por antaŭeniri. Dankon al nia ĉefa retejestro Hoss Firooznia pro lia laborego, kaj al la estraro por granda kvanto da komunikadoj, kiuj ebligis ĉi tiun restrukturadon.

Usona Esperantisto [Konsciigo, Komunumo, Kapabligo]

La redakcio de *Usona Esperantisto* aperigis la ĝustajn numerojn de nia organo regule kaj bonkvalite. Dankon al nia redaktoro Hoss Firooznia, kiu, kun la helpo de la direktoro Bill Harris, la estraro, kaj aliaj kontribuantoj, preparis bonan revuon ĉiujn du monatojn, per paperaj versioj en la poŝto kaj per nia retejo.

Duolingo kaj la Enkonduka Aliĝkosto [Komunumo]

Studantoj de Duolingo, kiuj finas la kurson (nivelo 1) rajtas aliĝi kun plenaj membrorajtoj al Esperanto-USA kontraŭ nur \$5.00. Tio allogas kelkajn novajn membrojn, sed nur tiujn, kiuj ekscias la oferton. Ĉi tiun oferton la antaŭa estraro aprobis antaŭ du jaroj en la Landa Kongreso

en Miami sub la gvido de Orlando Raola. La ideo venis de NASK en Raleigh en 2016 dum klasdiskuto kun Ruth Keves-Cohen kaj aliaj studentoj. Tiu oferto daŭras aktive.

Duolingo kaj lokaj grupoj [Komunumo, Kapabligo]

Pro tio ke pli ol 1,700,000 studentoj nun studas Esperanton per Duolingo, kaj pro tio ke multaj el tiuj estas Usonanoj (ĉefe junuloj), ni klopodas starigi kaj subteni lokajn grupojn en ĉiu regiono de Usono kiel eble plej vaste. Ni sufiĉas lasi lokaj kluboj fari sian proprajn planojn per ties propraj rimedoj. Ni klopodas helpi lokajn grupojn starigi, kreski, pliboniĝi, kaj maturiĝi. Tiurilate, ni rekomendas kaj provizas ilojn kaj helpon al la lokaj grupoj.

1. **Usona Esperantisto** havas rubrikon ***Loke*** kiu raportas pri lokaj grupoj.
2. **Nia retejo** enhavas la kontaktinformon pri lokaj grupoj: <http://esperanto-usa.org/groups/eo>. Se via urbo ne havas lokan grupon, kontaktu vian regionan kunordiganton (vidu sube pri tiuj).
3. **Meetups.com**: ni rekomendas kaj povas helpi lokajn grupojn uzu “Meetup” por anonci eventojn al la publiko. Meetups kostas, sed lokaj grupoj povas dividi la koston inter la membroj. Se tio ne eblas, la grupo povas peti helpon. La nuna helpanto por Meetups estas Hanso Becklin.
4. **Amikumu**: Ĉi tiu apo por poŝtelefonoj montras la plej proksimajn samideanojn, kiuj ankaŭ uzas la apon. Amikumu provizas mesaĝservon por komuniki kun la proksimaj novaj amikoj. Per tiu mesaĝilo, lokaj kluboj povas anonci eventojn al tiuj, kiuj ne konas la grupon. Amikumu estas senkosta.
- 5.
6. **Duolingo Events**: Kunveno de Loka grupo povas estas oficiala evento de Duolingo. Loka grupo havos gastiganton kaj registros ĉe events.duolingo.com. Kiam la evento por loka grupo estas registrita en la sistemo ĉe duolingo, kelkcent proksimaj studentoj ricevos retmesaĝojn pri tiu evento. Ĉi tiu estas senkosta servo. *Duolingo Events* havas aliajn helpojn por lokaj grupoj, kiuj helpas la lokan grupon plibonigi la eventojn.
7. **Zoom** interretaj kunsidoj: Lokaj grupoj povas uzi *Zoom* por komuniki kun ties regiona helpanto aŭ por regionaj kunsidoj kun aliaj lokaj grupoj. Ĉi tiu servo haveblas per monhelpo de *Esperantic Studies Foundation*. *Zoom* estas ilo por interreta kunsidoj, kiuj havas pli bonan teknologion ol kelkaj aliaj servoj.
8. **Regionaj kunordigantoj**: Por helpi la lokajn grupojn, la estraro starigis sistemon de regionaj helpantoj. Ĉi tiuj volontuloj komunikas kun lokaj grupoj en siaj regionoj, ekscias pri ties problemoj kaj defioj, ĝisdatigas la informon en nia retejo, kaj kunlaboras kun la estraro. Ĉi tiu estas granda aldono al nia komunika infrastrukturo. Ĝi estas nova iniciato, kaj daŭre evoluas. La regiona kunordiganto ludas tre gravan rolon en nia fortiĝado, ĉar lokaj grupoj vere estas sendependaj organizoj. Esperanto-USA ne rajtas dikti al lokaj grupoj kion fari. Ni aŭkultas, helpas, kaj konsilas. Vi povas trovi la liston de regionaj kunordigantoj en nia retejo. En la repaĝo de ĉiu regiono troviĝas retligon al la regiona kunordiganto por tiu regiono.

9. **Rimeda helpanto:** La regionaj helpantoj havas sian propran helpanton, kiu havas sperton kun la diversaj iloj. Nun tiu volontulo estas Kyle Bailey. La regionaj kunordigantoj rajtas komuniki kun Kyle pri aliroj kaj kiel uzi la komunikilojn.

Gvidlibro por Estraranoj [Kunordigo, Kapabligo]

Dum multaj jaroj ni ne havis gvidlibron por estraranoj. Nun ke la estraro estas multe pli aktiva ol antaŭe, ni bezonas gvidon por novaj estraranoj. Ben Speakmon, via vic-prezidanto, kaj mi nun kunverkas tiun libron.

La Kandidatiga Komitato [Kunordigo]

Sub la gvido de Fred Meyer III, la komitato trovis bonegan grupon de kandidatoj por servi en la estraro. Iliaj nomoj aperas sur la balotilo. Dankon al Fred kaj la komitato pro lia bona laboro. Nia estraro pli kaj pli boniĝas kaj aktiviĝas.

La Regionoj [Komunumo]

La Regionoj pli kaj pli aktivigas per kuniĝoj kaj kunlaboro. La anoncoj pri NOREK, ARE, PER, TKEK kaj aliaj regionaj kunvenoj aperas en nia retejo kaj nia bulteno *Usona Esperantisto*.

Novaj rilatoj en la regionoj kaj inter la regionoj okazas per la helpo de niaj regionaj kunordigantoj.

Membrolisto [Komunumo]

La membrolisto iĝos nia jarlibro, kun pli da informo pri nia organizo kaj niaj agadoj, sed eble sen la kutima membrolisto. Por gardi la informon de nia membraro, ni eble ne plu eldonos la liston de niaj membroj kun nomoj, adresoj, urboj, retadresoj, kaj telefonnumeroj. En ĉi tiu Landa Kongreso ni voĉdonos pri nova politiko pri gardi la informon de niaj membroj.

Pro la translokiĝo de nia centra oficejo de Kalifornio al Majno, ni ne havos nian jarlibron ĝis kelkaj monatoj post tiu taskego.

Membraro [Komunumo]

Ni havas 591 membrojn. La kvanto de membro ne plu falas. Ni planas membrecan kampanjon por la fino de 2018. Nia pli forta komunika strukturo ebligas al ni bonan projekton por la venonta jaro.

Kongresoj [Komunumo, Kunordigo]

Nia Landa Kongreso por 2017 okazis tre sukcese en Raleigh.

La Landa Kongreso por 2018 okazas en Seatlo kun specialaj gastoj Chuck Smith, Frederico Gobbo, muzikistoj, kaj aliaj. Post la kongreso la junuloj de USEJ tendumos en belega parko de Vaŝingtonio.

La Landa Kongreso por 2019 okazos en Bostono.

La Universala Kongreso de UEA en 2020 okazos en Montrealo! Kun tio Esperanto-USA helpas, subtenos, kaj partoprenos kiel eble pli grandskale. KEA oficiale provizos tiun Universalan Kongreson, sed la usonaj samideanoj certe helpas. La UK ne ofte okazas tiel proksime, kaj pro tio ni celas kunplani kaj helpi niajn amikojn en Kanado.

Komunikado [Konsciigo, Komunumo]

Komuniki restas samtempe granda pliboniĝo kaj granda defio. Pro tio, ke komunikado estas tiel grava al ni, kelkaj projektoj reaperos post la kongreso.

1. Pli da informoj pri lokaj grupoj en *Usona Esperantisto*. Niaj novaj regionaj kunordigantoj kunlaboros kun lokaj grupoj por raporti ties eventojn al redakcio. *Usona Esperanto* estas nia oficiala informilo. Niaj membroj rajtas sendi leterojn, komentojn, kaj demandojn al nia bulteno. Ni aŭskultas al vi.
2. Nia **retejo** enhavos informon pri eventoj, aparte pri la sukcesaj regionaj eventoj.
3. Ni restarigos **Retseminariojn** (“Webinars”). La estraro aŭ aliaj gvidantoj gastigos ĉi tiujn interesajn kunsidojn por prezenti informon kaj inviti viajn demandojn pri tiu informo. Tiel, ni ekscios plu pri niaj membroj kaj ties ideoj, projektoj, kaj defioj. Ni aŭskultas al vi. La horaro por la retseminarioj aperos en *Usona Esperantisto* kaj en nia retejo kiel eble plej frue.
4. Ni restarigos **AMA**-ojn, la tekstaj komunikilo en <https://www.reddit.com/r/EsperantoUSA/> aŭ <https://www.reddit.com/r/Esperanto/>. En ĉi tiuj sesioj, iu ajn rajtas demandi ion ajn al la gastiganto. Ni aŭskultas al vi. La horaro por la AMA-sesioj aperos en *Usona Esperantisto* kaj en nia retejo kiel eble plej frue.
5. Niaj membroj rajtas komuniki **rekte kun gvidantoj** de Esperanto-USA. La kontaktinformoj haveblas en nia retejo.

Resume

Dankon al la nuna estraro kaj la aliaj multaj volontuloj, kiuj helpas en la nova aktiveco en Esperanto-USA. Dankon al ESF por la monhelpo kaj la pli fortan rilaton.

Phil (“filipo”) DORCAS
Prezidanto, Esperanto-USA
filipo@grupoj.org

Raporto pri la 48-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2017

48 Consecutive Years

La 48a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazis por la kvara fojo ĉe William Peace Universitato en Raleigh, Norda Karolino. La Kino-Teatro-Festivalo (KTF) okazis samloke dum la tuta tempo do partoprenantoj povis ĉeesti ambaŭ programojn. NASK prezentis mallongan

ok-tagan kursaron. Formalaj klasoj okazis ĉiutage (eĉ semajnfine) je tri niveloj: post-komencanta ĝis supera. La instrua teamo konsistis el Katalin Kovats el Hungario kaj Nederlando en la supera kurso, Sylvain LeLarge el Francio kaj Nederlando en la meza kaj Lee Miller el Usono en la post-baza. Multaj el la aktivecoj estis bone raportitaj en la tag-jurnalo "La NASKa Fasko" redaktita de Brian Harmon, kiu ankaŭ gvidis la multajn ekskursojn. Oni povas legi la tag-jurnalojn ĉe: <http://nask.esperanto-usa.org>. Pro la fakto ke la Landa Kongreso okazis samloke tuj antaŭ NASK, kelkaj restis por la kursaro. La 68 partoprenantoj venis el 20 usonaj ŝtatoj, Kanado, Nederlando kaj Brazilo, do la etoso restis vere internacia.

La Fonduso "Schulze Education Endowment" de la Esperantic Studies Foundation (ESF) finance subtenis la tutan programon, do efektive ĉiu partoprenanto ricevis iom da subvencia helpo. . La "Schulze Education Endowment" estis kreita pere de la heredaĵo de Bill kaj Cathy Schulze por certigi la daŭron de la somera kursaro. 17 el la kursanoj ricevis aldonan subvencian helpon el la NASKE Fonduso de Esperanto-USA kiu valoris \$4,937. La NASKE Fonduso de Esperanto-USA estas longdaŭra fonduso kreita por helpi Esperanto-lernantojn studi ĉe NASK. Alia \$2000 venis el la Schulze-a Eduka Fonduso por subteni 4 instruantojn. Tiu fonduso estis kreita por subteni edukajn programojn de E-USA. La Kanada Esperanto-Asocio provizis stipendion al unu kanadano kaj planas fari same en 2017.

Pro propono de Lee Miller, NASK ricevis \$2000 el la Schulze-a Eduka Fonduso por trajnado de estontaj NASK-instruistoj. Thomas Alexander instruis kelkajn el la klasoj en la post-baza nivelo sub la gvido de Lee Miller. John Bentley and Ben Speakmon observis la instruadajn teknikojn de Katalin kaj Sylvain. Martin LeLarge provizis lingvan helpon al la klasanoj, aparte la gejunuloj.

Duncan Charters, kiu ofte instruis ĉe NASK, ĉeestis kaj multe helpis Katalin pri la KER-ekzamenoj (12 sukcesis dum NASK kaj 7 antaŭe dum la landkongreso), faris prezentojn kelkfoje kaj ankaŭ faris taksadon, ĉefe de homoj kiuj lernis Esperanton pere de Duolingo. Pri tio li konstatis mezureblan progreson en ĉiu persono, eĉ la malpli kapablaj, post nur 5 tagoj de NASK-instruado.

Pro la nombro de studentoj kaj la diverseco de iliaj lingvo-kapabloj, Lee Miller proponis ke venontan jaron, ni ofertos 4 nivelojn de instruado.

En 2018, NASK revenos al William Peace University en Raleigh, Norda Karolino kaj ofertos 4 nivelojn de instruado. La instruteamo estos Anna Löwenstein el Italio, Kataline Kovats el Hungario kaj Nederlando, Thomas Alexander el Novjorko. Lee Miller el Misurio helpos en la aranĝoj kaj Brian Harmon el Arkansaso agados kiel redaktoro kaj gvidanto de eksterklasaj aferoj.

Ellen M. Eddy
Administranto NASK
La 2an de junio 2018

Raporto de la Daŭra Landa Kongresa Komitato 2018

La ĉefa tasko de la Landkongresa Komitato (LKK) estas trovi lokon kie ekzistas Esperantistoj kiuj estas pretaj gasitigi la landkongreson de Esperanto-USA dum la venonta(j) jaro(j).

Ni tre dankas al Nikvo Woods, Jordon Kallich, kaj Ben Speakmon en Seatlo kiuj konsentis gastigi nian 2018 landkongreson plus aliaj membroj de la landkongreso komitato ĉi jaron: Jaclyn Pacejo de la Bostona regiono, Chuck Mays de Raleigh kaj Phil Dorcas, Prezidanto de Esperanto-USA, kiu helpis starigi la komitaton. Ni ankaŭ dankas Vilĉjo HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo, kiu kiel kutime multe helpis rilate al la raportoj kaj aliaj detaloj de la landkongreso

Ni serĉis lokon por la 2019 landkongreso, kaj ŝajne ni sukcesis trovi lokon kie ekzistas Esperantistoj kiuj estas pretaj gastigi la venonta landkongreso. Jaclyn Pacejo de la Bostona regiono indikis ke ili estas pretaj gastigi la landkongreson en la venonta jaro.

Aliaj nunaj membroj de la Landkongresa Komitato estas Orlando RAOLA, kaj Alexander SHAFER.

Ronald J. GLOSSOP <rglossop@mindspring.com>, Estro, Landkongresa Komitato

The main task of the National Congress Committee (NCC) is to find a place where there are Esperantists who are ready to host the national convention of Esperanto-USA during the coming year(s).

We very much thank Nikvo Woods, Jordon Kallich, and Ben Speakmon in Seattle who agreed to host our 2018 national convention plus other members of the national convention committee this year: Jaclyn Pacejo of the Boston region, Chuck Mays of Raleigh and Phil Dorcas, President de Esperanto-USA, who helped set up the committee. We also thank Bill HARRIS, Director of the Central Office, who as usual helped greatly in connection with the reports and other details of the national convention.

We searched for a place for the 2019 national convention, and it seems that we have succeeded in finding a place where are there Esperantists who are willing to host the coming national convention. Jaclyn Pacejo of the Boston area has indicated that a group of Esperantists in and around Boston has indicated that they are ready to host the national convention next year.

Other present members of the National Congress Committee are Orlando RAOLA, and Alexander SHAFER .

Ronald J. GLOSSOP <rglossop@mindspring.com>, Chair, National Congress Committee

Raporto pri Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo

Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo estas fondita de Charlotte Kohrs en San-Diego, Kalifornio en Majo 1987. Dum jaroj Charlotte instruis Esperanton al infanoj en San-Diego kaj ankaŭ produktis videobendojn, elsendis duonjarajn bultenojn por infanoj, komponis kantojn por instrui Esperanton al infanoj, kaj verkis libretojn, kiuj povas servi kiel lernolibroj por infanoj. Ŝi mortis en la jaro 2002. Oni nun povas akiri tiujn materialojn perrete ĉe <<http://www.icxlm.org>> aŭ perpoŝte de mi.

En la jaro 2001 mi konsentis iĝi la Direktoro de Infanoj ĉirkaŭ la Mondo. Post tri jaroj mi transportis al mia domo la materialojn, kiujn Charlotte havis en San-Diego. Sekve, mi povis respondi al petoj por ĉi tiuj materialoj kaj produkti pluajn ekzemplerojn el ili kiam ili estas bezonataj. Mi sendis ekzemplerojn de ĉiuj tiuj libretoj al Katalin Kovats en Nederlando, por ke ŝi povu priskribi ilin en <<http://www.edukado.net>>, la retejo por instruistoj. Mi ankaŭ kutime montras kelkajn IĈLM-materialojn ĉe la Movada Foiro ĉe la U.K.-oj. Mi mem verkis ok novajn

strofojn por la Kanto de la Koloroj. Nun mi produktas kaj distribui novajn lamenigitan libretojn pri tiu kanto.

Mi komunikas kun geinstruistoj de Esperanto en aliaj landoj, aparte tiuj en Afriko kies lernantoj ofte estas orfoj. Mi sendas senpage instru-materialojn, inkluzive de papero kaj skribiloj. Kelkfoje mi sendas monhelpon. Unu tia instruisto estas GBADAMASSI Latifou en BENINO, kiu starigis sian propran organizaĵon “Infanoj Ĉirkaŭ Afrika.” Mi ankaŭ sendis instru-materialojn kaj monhelpon al Mana BRINSON, ZAWADI Joice, Charlotte MIGNONNE, kaj multaj aliaj geinstruistoj en Ruando kaj la Demokrata Respubliko de Kongo, al Christine MBAZUMUTINA en Malawi, kaj al Hassano NTAHONSIGAYE en Burundo.

En 2005 Enrique Elleberg komencis mastrumi nian reteon ĉe <<http://www.icxlm.org>>. Li ankaŭ provizas tradukojn en la hispanan lingvon krom la anglan. En nia IĈLM-retejo oni povas vidi instru-videofilmojn kaj eĉ videofilmon en kiu multaj homoj en Burundo kantas la “Kanton de la Koloroj” ĉe <<http://www.youtube.com/watch?v=QmW06-FUqD4>>.

IĈLM bezonas monon por ke ni povu sendi materialojn & monhelpon al instruistoj de Esperanto en malriĉaj landoj. Vi povas sendi kontribuojn al la oficejo de EUSA kun noto ke ĝi estas por IĈLM.

Ronald J. Glossop, <rglossop@mindspring.com>, Direktoro, IĈLM.

Children Around the World was founded by Charlotte Kohrs in San Diego, California in May 1987. For years Charlotte taught Esperanto to children in San Diego and also produced videotapes, sent out semiannual newsletters for children, composed songs to teach Esperanto to children, and wrote booklets which could serve as textbooks for children. She died in 2002. One now can acquire those materials via the internet at <<http://www.icxlm.org>> or by regular mail from me.

In the year 2001 I agreed to become the Director of Infanoj ĉirkaŭ la Mondo. Three years later, I transported to my house the materials which Charlotte had in San Diego. Consequently, I was able to respond to requests for these materials and to produce additional copies of them when needed. I sent copies of all these booklets to Katalin Kovats in the Netherlands so that she could describe them in <<http://www.edukado.net>>, the web-site for teachers. I also usually show some IĈLM materials at the Movada Foiro at the U.K.s. I myself composed eight new verses for the Song of the Colors. I now produce and distribute new laminated booklets about that song.

I communicate with teachers of Esperanto in other lands, especially those in Africa whose pupils often are orphans. I send without charge instructional materials, including paper and writing instruments. Sometimes I send financial help. One such instructor is GBADAMASSI Latifou in BENIN who established his own organization “Children around Africa.” I also have sent instructional materials and money to Mana BRINSON, ZAWADI Joice, Charlotte MIGNONNE, and many other teachers in Rwanda and the Democratic Republic of Congo, to Christine MBAZUMUTINA in Malawi, and to Hassano NTAHONSIGAYE in Burundi.

In 2005 Enrique Elleberg began to manage our website at <<http://www.icxlm.org>>. He also provides translations into Spanish in addition to the English. On our IĈLM website one is able to see instructional videos and even a U-tube video in which many people in Burundi sing “Song of the Colors” at <www.youtube.com:80/watch?v=QmW06-FUqD4>.

IĈLM needs money so that we can send materials and financial help to teachers of Esperanto in poor countries. You can send contributions to the office of EUSA with a note that it is for IĈLM.

Ronald J. Glossop, <rglossop@mindspring.com>, Director, IĈLM.

Raporto de la Direktoro

Membrecoj

En 2017, la estraro konsentis oferti \$5.00 membrecojn al tiuj, kiuj (1) ne antaŭe estis membroj de E_USA kaj (2) finis retan Esperantan kurson (i. a. Duolingo, Lernu.net). Ĝis nun, 66 homoj aliĝis per tiu membrecon. Entute, Esperanto-USA havas 594 membrojn.

Retbutiko

Iom post iom, la priskriboj de la libroj en la retbutiko aperas en ambaŭ lingvoj – Esperanto kaj la angla. Pro ke estas pli ol 2000 titoloj en la retbutiko, la projekto daŭrigos dum jaroj.

Elektronikaj libroj (bitlibroj) igas pli kaj pli popularoj ĉe la retbutiko. Komence de 2013, venis pli ol 1400 mendoj por elektronikaj libroj, (La plejmulto de bitlibroj estas senpagaj por membroj de E-USA).

Mi komencas vendi la plej popularajn librojn per Amazon.com. Hoss Firooznia proponis tion, kaj mi konsentis, ĉar Amazon estas tre konata vendejo en Usono, kaj multaj homoj kiuj aliĝis al Amazon Prime spertos rapidan liveradon. Plue tiuj kiuj trovas Esperanton en Amazon lernas pri Esperanto-USA.

Mi ankaŭ komencis vendi la nepopularajn librojn rekte de UEA. Tiu signifas, ke libro aperas en nia retbutiko, kaj klientoj povas aĉeti ilin tie, sed mi plusendos la mendon al UEA, kiu plenumas la mendon kaj sendas la librojn rekte al la kliento.

Demandoj

Grava tasko de la Direktoro estas respondi al la dekoj de demandoj, kiuj venas ĉiutage al la oficejo. Temas pri demandoj por konsilo pri Esperanta lernado, demandoj pri mendoj, plendoj pri malfruaj pakaĵoj, petoj por informo, k.t.p. Proksimume 25% de la laboro en la oficejo rilatas al tiaj demandoj.

Kontaktuloj

Ĝis nun mi trovis 44 membroj kiuj konsentis igi kontaktulojn. Mi daŭre serĉas por pli da kontaktuloj.

Bill Harris, Direktoro de la Centra Oficejo
eusa@esperanto-usa.org

FINANCAJ DOKUMENTOJ

Esperanto-USA
Statement of Activities
Calendar year 2017 and Comparative 2016

	Unrestricted	Restricted	Interest Only	Total 2017	Total 2016
Contributions (Note 1)	\$13,745	\$11,611	\$258	\$25,614	\$22,949
Annual Dues	16,471			16,471	16,709
Net Catalog and Subscription Sales (Note 2)	4,017			4,017	4,263
Net UEA Membership/Services	924			924	1,125
Net Convention Income	2,770			2,770	(1,029)
Net Investment Income	2,294	1,809	-	4,103	15,976
Net Correspondence Course Income	18			18	(38)
Misc. Income	21			21	5
Total revenues, gains, and other support	\$40,258	\$13,421	\$258	\$53,937	\$59,962
Esperanto Courses & Educ. Expenses (Note 3)	\$-	\$4,937		\$4,937	\$5,580
Educational Video Expenses	-	-		-	-
Publication and Publishing Expenses	4,348			4,348	2,296
Expenses of Promoting Esperanto (Note 4)	1,212	7,228		8,439	4,212
Membership Maintenance Expenses	5,521			5,521	5,631
Management and General Expenses(Unallocated)					
Salaries & Related (Note 5)	31,515			31,515	31,515
Rent & Utilities (Note 6)	24,213			24,213	22,773
Office and Misc. (Note 7)	3,840			3,840	5,069
Total expenses	\$70,649	\$12,165	\$-	\$82,813	\$77,074
Net Gain/(Loss)	(\$30,391)	\$1,256	\$258	(\$28,877)	(\$17,112)
Net Assets at the beginning of the year	\$106,663	\$72,152	\$152,893	\$331,708	
Adjustments:				-	
Exchange rate correction				-	
This year's total gains and losses	(30,391)	1,256	258	(28,877)	
Total Equity YTD	\$76,272	\$73,408	\$153,151	\$302,831	

1 - Includes all fund contributions, plus Friends of Esperanto Dues, less new Life Memberships, plus in-kind donations

2 - Includes Catalog and Non-Inventory Sales, EUSA Published Book Sales, Subscription Sales, Postage/Handling Fees Rec'd; Less related Expenses

3 - Includes Postal Courses, NASKE Expenses, CATW Expenses and Goldman Expenses

4 - Includes Expenses of Thompson Fund (Travel), Schulze Fund, Wolff Fund, Harlow Fund, Glenny Fund, and Marketing Expenses

5 - Includes Salaries, Payroll Taxes, Staff Benefits & Training

6 - Includes Rent, Utilities, Telephone/Fax, Internet Access, Office Insurance

7 - Includes Payroll Fees, Office Postage and Expenses, Small Equipment Purchases, Equipment Maintenance, Licenses/Permits/Taxes, Bank Charges, Liability Insurance and Miscellaneous Expenses

Esperanto-USA
Statement of Financial Position
As of Year End 2017

	<u>Dec 31, 2017</u>	<u>Dec 31, 2016</u>		<u>Dec 31, 2017</u>	<u>Dec 31, 2016</u>
ASSETS			LIABILITIES & EQUITY		
Current Assets			Liabilities		
Cash/Checking/Savings			Current Liabilities		
11100 · Petty Cash	\$100	\$100	21100 · Accounts Payable	\$-	\$-
11300 · Undeposited Funds	2,169	4,348	21400 · Sales Tax Payable	269	312
11400 · Checking, Comm Bank	11,575	11,562	21700 · A/P Subscriptions	247	30
11450 · Money Market, Comm Bank	-	-	21800 · A/P UEA	465	73
11460 · PayPal	3,813	2,730	22599 · Outstanding Payables	-	-
Total Cash/Checking/Savings	<u>\$17,658</u>	<u>\$18,741</u>	22500 · Gift Certificate Payable	195	195
Other Current Assets			22900 · E-USA kontoj	31,309	26,643
11475 · UEA konto	\$(1,470)	\$(1,615.15)	Total Current Liabilities	<u>\$32,485</u>	<u>\$27,253</u>
11500 · Credit Card Payments	-	-	Long-Term Liabilities		
12200 · Accounts Receivable	2,848	2,218	22700 · Life Memb.	<u>\$27,045</u>	<u>\$28,281</u>
Total Other Current Assets	<u>\$1,378</u>	<u>\$602</u>	Total Long-Term Liabilities	<u>\$27,045</u>	<u>\$28,281</u>
Other Assets			Total Liabilities	<u>\$59,530</u>	<u>\$55,534</u>
11600 · Investments	\$308,566	\$334,463	Equity		
11800 · Land, El Paso	1,121	1,121	39100 · Unrestricted Net Assets	\$76,189	\$106,663
12400 · Book Service Inventory	28,976	27,654	39200 · Temporarily Restricted	73,491	72,152
12500 · Prepaid Expenses	-	-	39300 · Permanently Restricted	153,151	152,893
11900 · Items Donated	4,662	4,662	Total Equity	<u>\$302,831</u>	<u>\$331,708</u>
Total Other Assets	<u>\$343,326</u>	<u>\$367,899</u>	TOTAL LIABILITIES & EQUITY	<u>\$362,362</u>	<u>\$387,242</u>
TOTAL ASSETS	<u>\$362,362</u>	<u>\$387,242</u>			

Statement of Fund Activity 2017

	Beginning Balance	Donations Received	Expenses	Transfers	Balance Before Inv.Inc.	Investment Income	Adjusted Ending Balance
Unrestricted Funds							
* General	\$(17,451.80)	\$12,409.60	\$14,357.29	\$(17,810.58)	\$(37,210.07)	\$1,342.28	\$(35,867.79)
* Gibson Endowment	26,410.27	1,250.00	-	-	27,660.27	-	27,660.27
H.E. Reed Education	-	-	-	-	-	-	-
* Life Membership	36,987.57	800.00	-	2,035.65	39,823.22	-	39,823.22
Glenny	3,508.90	85.00	-	-	3,593.90	0.47	3,594.37
* Publishing	47,795.42	-	-	774.93	48,570.35	565.45	49,135.80
Goldman Education	15,450.98	25.00	-	-	15,475.98	385.79	15,861.77
Total Unrestricted	\$112,701.34	\$14,569.60	\$14,357.29	\$(15,000.00)	\$97,913.65	\$2,293.99	\$100,207.64
Restricted Funds							
NASKE	\$2,954.86	\$6,520.00	\$4,937.00		4,537.86	\$93.28	4,631.14
Educational Video	14,277.07	25.00	-		14,302.07	169.20	14,471.27
Thompson	349.16	1,045.00	948.40		445.76	5.49	451.25
Schulze Education	48,137.07	(850.00)	2,000.00		45,287.07	1,230.68	46,517.75
CATW Education	1,018.26	186.00	-		1,204.26	82.11	1,286.37
Wolff Publicity	3,427.17	108.00	-		3,535.17	127.24	3,662.41
Klara Zamenhof	1,546.39	25.00	-		1,571.39	18.59	1,589.98
Don Harlow Literatura	1,858.79	-	-		1,858.79	21.99	1,880.78
777 Fund	426.87	3,685.20	3,429.11		682.96	20.53	703.49
Amikeco Translimen	592.99	25.00	-		617.99	7.31	625.30
Festoj	2,718.88	75.00	-		2,793.88	33.05	2,826.93
Total Temp. Restr.	\$77,307.51	\$10,844.20	\$11,314.51	\$-	\$76,837.20	\$1,809.48	\$78,646.68
Interest-Only (Permanently Restricted) Funds							
Massey	\$70,805.34	\$-	\$-		70,805.34	\$-	\$70,805.34
Thomas A Goldman	17,133.00	-	-		17,133.00	-	17,133.00
Ellen Lewis	4,448.01	-	-		4,448.01	-	4,448.01
Catherine & William Schulze	58,075.83	150.00	-		58,225.83	-	58,225.83
Wolff Publicity Endowment	7,111.72	108.00	-		7,219.72	-	7,219.72
Children Around the World	5,832.52	-	-		5,832.52	-	5,832.52
Total Perm. Restr.	\$163,406.42	\$258.00	\$-	\$-	\$163,664.42	\$-	\$163,664.42
Total of all Funds	\$353,415.27	\$25,671.80	\$25,671.80	\$(15,000.00)	\$338,415.27	\$4,103.47	\$342,518.74

Statement of Fund Activity 2017

NOTES:

General Fund Donations reflect contributions to General Fund and Friends of Esperanto Dues;
Expenses reflect adjustment to balance receipts and expenditures
Life Membership Transfers reflect annual amortization of Life Memberships at 7% to Annual Du
Publishing Fund Transfers reflect annual allocation of 50% of net profits from
ELNA-published books
Income generated in Gibson Endowment, Life Membership, and Massey Funds
goes to General Fund
Income generated in Ellen Lewis Fund goes to NASKE Fund
\$15,000 transferred from the General Fund to the CO

Net Investment Income Includes:	
Interest/Dividend Income	\$6,486.62
Gains(Losses) Realized	\$-
Unrealized Gains (Losses)	(2,378.15)
Expenses:Svc Chgs	(5.00)
Net Investment Income	\$4,103.47